

Johann Wolfgang von Goethe,

Same

tradukita de Pejno Simono

Super montopintoj —
 silent',
 tra pinopingo
 la senvent'
 spiras sen fort';
 arbare la birdoj ekmutas.
 Pretu, aludas
 silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14
 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Johann Wolfgang von Goethe,

Из Гёте

tradukita de Михаил Лермонтов

Горные вершины
 Спят во тьме ночной;
 Тихие долины -
 Полны свежей мглой;
 Не пылит дорога,
 Не дрожат листья ...
 Подожди немного,
 Отдохнешь и ты.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en la Rusan de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 - †1841-07-27).*

Arg-356-1908 (2013-12-12
 22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en <http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm>. Vidu ankaŭ la retejon <http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986>. Pri la poeto Lermontov vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил_Лермонтов. La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.

Johann Wolfgang von Goethe,

Same tiel

tradukita de Richard Schulz

Super ĉiuj montoj
 Trankvil',
 Kaj ĉiuj fontoj
 Sen babil';
 Aŭdas vi ne
 Birdetan ĉirpon arbare.
 Pensu prepare
 Pri la pere'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Richardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26).*

Arg-356-706 (2013-02-26
 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Richardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.